

AL DIOGNETO

el la Helena tradukis
GERRIT BERVELING

Al Diogneto

Elhelenigis
Gerrit Berveling

Origine eldonita kiel numero 4 en la serio Voĉoj Kristanaj.

Elektronigita laŭ la dua eldono: Vlaardingen, 1986.

Al Diogneto

Enkonduko

En la jaro 1592 la eldonejo de l' fama humanisto-eldonisto Henriko Stefano liveris al la klera legantaro la unuan eblon, legi ĉi tiun *Al Diogneto*: kune kun "De Monarchia, Cohortatio ad Gentes, Expositio Fidei kaj Oratio ad Graecos"; ĉiuj ĉi estis editoritaj surbaze de unu kodekso el la 13a/14a jc, atribuanta ilin al Justino Martiro.

Depost tiam oni atingis unuanimecon almenaŭ negativan: *Al Diogneto* ne povas esti verkita de tiu Justino, kiu tiel neklasikan stilon montras en siaj ceteraj verkaĵoj — kontraste kun la klasikeco stila de tiu ĉi, dum ankaŭ ne estas tre verŝajne, ke li en tiel mallonga tempo tiel funde povus opiniŝanĝiĝi: ĉar enhance la diferencoj ne tre etas...

Sed kiu do estas la (nun) anonima aŭtoro de ĉi apologio de la frua kristanismo? Kaj kiu povas esti tiu Diogneto, al kiu li (ŝi?) ĝin direktas?

Depost la 17a jc oni menciis kiel eventualajn verkintojn ne malmultajn famulojn el plej diversaj epokoj: citeblas kiel tiaj i.a. Apolos (vidu I Kor. 3:4), Klemento el Romo, Aristido, Marciono k.t.p. Foje eĉ, plene forgesante ke la kodekso ĝin koniginta devenas el la 13a/14a jc, iu hipotezis ĝin falsaĵo el la 15a jc!

Teorio tre alloga, kvankam ne 100%-e pruvebla, venas de P. Andriessen: li kombinas konatajn faktojn tiel. Certa Kvadrato verkis apologion de l' kristanismo en stilo, kiun laŭdis pluraj (i.a. Eŭsebio) kiel klasikan. Li atakis — laŭ la sciigoj — ne nur la Romian-Helenan religion, sed ankaŭ Judismon, precipe rilate oferbuĉadon. Malsame ol liaepoka kutimo, li ne utiligis multajn mitologiaĵojn por — tiujn mokante — ataki la 'paganismon'.

Sian defendon li en Ateno prezentis al iu Cezaro, komenco de la 2a jc. Ĉio ĉi povus aplikiĝi je *Al Diogneto*: neniuj detaloj kontraŭas tion. De Kvadrato restas al ni nur kelkaj linioj kun plena certeco. Eŭsebio (*Historio Eklezia IV, 3, 1-2*) konservis ĝin.¹ — Sed oni diros: tiuj linioj ne troviĝas en la teksto de *Al Diogneto*. Tiu konstato tamen ne jam multe pravas, ĉar la sola kodekso konservinta ĉi apologion por ni (ĉe brulo ĝi bedaŭrinde neniigis) jam enhavis la indikon, ke ĝi estas kopio de tre malnova kodekso kun — ĝuste pro sia aĝo — du lakunoj... Kaj en la unua lakuno bone kongruus rakontado pri la mirakloj de Jesuo, pri ties pruvo (inkl. la frazojn de Kvadrato), kaj fine pri la heroeco de la sekvantoj de Jesuo — eĉ ĝis en leonbuŝo! Tiam do refoje: nenia pruvo, sed ambaŭ Kvadrato kaj nia anonimulo povus esti identaj.

Kaj Diogneto? Kiu li?

Laŭ niaj fontoj, Imperiestro Marko Aŭrelio estis edukita “in Adriani gremio”,² sed kiam Marko mem en siaj *Pensadoj* rakontas pri sia eduko, inter la tuta aro da nomoj de li menciitaj mankas... Hadriano, dum samloke legiĝas nomo de nekonata Diogneto! Se krome ni scias, ke jam en la jaro 112 Hadriano estis arĥonto de Ateno, titolo kun kiu ofte ligiĝis la indiko “Dinaskita” (kio estas ĝuste la senco de Diogneto), ni eble komprenas, kial P. Andriessen ĉi ĉion kombinante, asertas, ke Diogneto envere estis Imperiestro Hadriano, al kiu — okaze de lia vizito al Ateno, por tie iniciĝi en la Eleŭzisaj misteroj — direktis tiun ĉi apologion Kvadrato.

Tiel do solviĝus ambaŭ anonimecoj.

Ankaŭ aliarilate la teorio estas alloga: la teksto de *Al Diogneto* ja multloke parolas pri kono aŭ scio (kern-vortoj de la misterokulto Eleŭzisa), dum krom tio estas konata la aserto de malnova historiisto, ke Kvadrato laŭtlegis sian tekston por aŭdantaro de kristanoj kaj paganoj “et audiebat unusquisque lingua sua illum loquentem”: ĉiu aŭdis lin paroli en sia propra lingvo, t.e. ke liaj paroloj havis fundan signifon kaj sencon por *ambaŭ grupoj*. Kristanoj kompreneble komprenis ĝin kristane, sed enestas tiom da terminoj sed ankaŭ enhavo, memoriganta pri la misterokulto, ke ĵus iniciĝintoj tion tuj perceptus: puriĝo, vidi la misterojn, vidi Dion k.t.p.

Resume ni povas diri, ke *Al Diogneto* datiĝas de la unua kvarono de l’ 2a jc, — ke probable ĝi estis verkita en Ateno por prezentado al Cezaro Hadriano, — ke eble Kvadrato estas la anonima aŭtoro kiu verkis ĉi liniojn, kiuj prave disfamiĝis kiel unu el la perloj de la Prakraĥristanismo.

Kaj ni nuntempuloj, ĉu valoras por ni legi tekstojn tiel malnovajn? Laŭ mia firma konvinko: certe. Ni nunuloj iom pli funde ekkonu la radikojn — kaj Judajn kaj ne-Judajn

1 Vidu post nia traduko.

2 Vita M. Antonini IV, 1.

— de “nia” religio. Ekz. kio estas dirita en X.6: “fariĝi Dio por la aliaj...” Ĉu ne ĝuste en tio kuŝas la kerno de la prakristana elano? — Kaj samtempe “surpreni sur sin la ŝarĝojn de la proksimulo” estas “vivi en la ĉielo” (X.7). Aŭ ĉu mi ne bone interpretas?

Kaj lia interpreto de la rakonto Biblia pri la paradizo de plezuro³ nin povas trafi kvazaŭ tre moderna ekzegezo — XII.1 k.s.: ni *mem* devas fariĝi tia Ĝardeno de Plezuro, kaj en ni kresku ambaŭ la famaj arboj: tiu de la scio kaj tiu de la vivo. Unu estas nedisigebla de la alia...

3 172 — Eden signifas “plezuro” (Gen. 2:8).

Ἐπιστολή πρὸς Διόγνητον

I.1. Ἐπιστολή ὄρω, κράτιστε Διόγνητε, ὑπερεσπουδακότα σε τὴν θεοσέβειαν τῶν Χριστιανῶν μαθεῖν καὶ πάνυ σαφῶς καὶ ἐπιμελῶς πυνθανόμενον περὶ αὐτῶν, τίνι τε θεῷ πεποιθότες καὶ πῶς θρησκεύοντες αὐτὸν τὸν τε κόσμον ὑπερορῶσι πάντες καὶ θανάτου καταφρονοῦσι καὶ οὔτε τοὺς νομιζομένους ὑπὸ τῶν Ἑλλήνων θεοὺς λογίζονται οὔτε τὴν Ἰουδαίων δεισιδαιμονίαν φυλάσσουσι, καὶ τίνα τὴν φιλοστοργίαν ἔχουσι πρὸς ἀλλήλους, καὶ τί δὴ ποτε καινὸν τοῦτο γένος ἢ ἐπιτήδευμα εἰσῆλθεν εἰς τὸν βίον νῦν καὶ οὐ πρότερον· ἀποδέχομαί γε τῆς προθυμίας σε ταύτης καὶ παρὰ τοῦ θεοῦ, τοῦ καὶ τὸ λέγειν καὶ τὸ ἀκούειν ἡμῖν χορηγοῦντος, αἰτοῦμαι δοθῆναι ἔμοι μὲν εἰπεῖν οὕτως, ὡς μάλιστα ἂν ἀκούσαντά σε βελτίω γενέσθαι, σοί τε οὕτως ἀκοῦσαι, ὡς μὴ λυπηθῆναι τὸν εἰπόντα.

Al Diogneto

Traduko

enkonduko

I.1. Ĉar mi vidas, ho plej eminenta Diogneto, ke ege vi klopodas por ekkoni la religion de la kristanoj kaj por tre funde kaj ekzakte ekscii pri ili: al kiu Dio ili fidas kaj pro kiu kulto al Li ili ĉiuj malestimas la mondon kaj malŝatas la morton kaj kial ili opinias ke ne estas Dioj, kiujn la Grekoj opinias tiaj, kaj kial ili ne gardas la superstiĉon de la Judoj, kaj kian tenerecon ili havas reciproke inter si, kaj kial, fine, tiu ĉi genro aŭ vivostilo nova envenis en la vivon ĵus nun kaj ne plifruo: mi laŭdas tiun vian deziron kaj mi demandas Dion, kiu donas al ni kaj la parolon kaj la aŭdon, ke estu donite al mi, tiel paroli ke vi aŭskultante pliboniĝu, kaj al vi, tiel aŭskulti ke ne tristiĝu la parolanto.

II.1. Ἄγε δὴ, καθάρας σεαυτὸν ἀπὸ πάντων τῶν προκατεχόντων σου τὴν διάνοιαν λογισμῶν καὶ τὴν ἀπατῶσάν σε συνήθειαν ἀποσκευασάμενος καὶ γενόμενος ὡσπερ ἐξ ἀρχῆς καινὸς ἄνθρωπος, ὡς ἂν καὶ λόγον καινοῦ, καθάπερ καὶ αὐτὸς ὠμολόγησας, ἀκροατῆς ἐσόμενος· ἴδε μὴ μόνον τοὺς ὀφθαλμοῖς, ἀλλὰ καὶ τῇ φρονήσει, τίνος ὑποστάσεως ἢ τίνος εἴδους υγχάνουσιν, οὓς ἐρεῖτε καὶ νομίζετε θεοὺς. **2.** οὐχ ὁ μὲν τις λίθος ἐστίν, ὅμοιος τῷ πατρουμένῳ, ὁ δ' ἐστὶ χαλκός, οὐ κρείσσων τῶν εἰς τὴν χρῆσιν ἡμῖν κεχαλκευμένων σκευῶν, ὁ δὲ ξύλον, ἤδη καὶ σεσηπός, ὁ δὲ ἄργυρος, χρῆζων ἀνθρώπου τοῦ φυλάξαντος, ἵνα μὴ κλαπῆ, ὁ δὲ σίδηρος, ὑπὸ ἰοῦ διεφθαρμένος, ὁ δὲ ὄστρακον, οὐδὲν τοῦ κατεσκευασμένου πρὸς τὴν ἀτιμοτάτην ὑπηρεσίαν εὐπρεπέστερον; **3.** οὐ φθαρτῆς ὕλης ταῦτα πάντα; οὐχ ὑπὸ σιδήρου καὶ πυρὸς κεχαλκευμένα; οὐχ ὁ μὲν αὐτῶν λιθοξόος, ὁ δὲ χαλκεύς, ὁ μὲν αὐτῶν λιθοξόος, ὁ δὲ χαλκεύς, ὁ δὲ ἀργυροκόπος, ὁ δὲ κεραμεὺς ἔπλασεν; οὐ πρὶν ἢ ταῖς τέχναις τούτων εἰς τὴν μορφήν τούτων ἐκτυπωθῆναι, ἣν ἕκαστον αὐτῶν ἐκάστω, ἔτι καὶ νῦν, μεταμεμορφωμένον; **4.** οὐ τὰ νῦν ἐκ τῆς αὐτῆς ὕλης ὄντα σκεύη γένοιτ' ἂν, εἰ τύχοι τῶν αὐτῶν τεχνιτῶν, ὅμοια γενέσθαι τοῖς λοιποῖς; οὐ κωφὰ πάντα; οὐ τυφλά; οὐκ ἄψυχα; οὐκ ἀναίσθητα; οὐκ ἀκίνητα; οὐ πάντα σηπόμενα; οὐ πάντα φθειρόμενα; **5.** ταῦτα θεοὺς καλεῖτε; τούτοις δουλεύετε; τούτοις προσκυνεῖτε, τέλεον δ' αὐτοῖς ἐξομοιοῦσθε. **6.** διὰ τοῦτο μισεῖτε Χριστιανούς, ὅτι τούτους οὐχ ἠγοῦνται θεοὺς; **7.** ὑμεῖς γὰρ αἰνεῖν νομίζοντες καὶ οἰόμενοι, οὐ πολὺ πλέον αὐτῶν καταφρονεῖτε; οὐ πολὺ μᾶλλον αὐτοὺς χλευάζετε καὶ ὑβρίζετε, τοὺς μὲν λιθίνους καὶ ὄστρακίνους σέβοντες ἀφυλάκτους, τοὺς δὲ ἀργυρέους καὶ χρυσοῦς ἐγκλείοντες ταῖς νυξὶ καὶ ταῖς ἡμέραις φύλακας παρατιμαῖς προσφέρειν; **8.** εἰ μὲν αἰσθάνονται, κολάζετε μᾶλλον αὐτούς· εἰ δὲ ἀναισθητοῦσιν, ἐλέγχοντες αἵματι καὶ κνίσαις αὐτοὺς θρησκεύετε. **9.** ταῦθ' ὑμῶν τις ὑπομεινάτω, ταῦτα ἀνασχέσθω τις ἑαυτῷ γενέσθαι. ἀλλὰ ἄνθρωπος μὲν οὐδὲ εἷς ταύτης τῆς κολάσεως ἐκὼν ἀνέξεται, αἴσθησιν γὰρ ἔχει καὶ λογισμὸν· ὁ δὲ λίθος ἀνέχεται, ἀναισθητεῖ γάρ. οὐκ οὖν τὴν αἴσθησιν αὐτοῦ ἐλέγχετε; **10.** περὶ μὲν οὖν τοῦ μὴ δεδουλῶσθαι Χριστιανούς τοιούτοις θεοῖς πολλὰ μὲν ἂν καὶ ἄλλα εἰπεῖν ἔχοιμι· εἰ δὲ τινὶ μὴ δοκοῖη κἂν ταῦτα ἱκανά, περισσὸν ἠγοῦμαι καὶ τὸ πλείω λέγειν.

refuto de la idolkulto

II.1. Nu do, purigu vin mem de ĉiuj pensoj, kiuj la menson antaŭe jam ligas, kaj senigu vin de la kutimo, kiu vin blindigas, kaj fariĝu — kiel origine — nova homo, por ke ankaŭ novan parolon (kiel ankaŭ vi mem ĝin titolas) vi aŭskultu; rigardu ne nur per la okuloj, sed ankaŭ per la intelekto: el kiu substanco aŭ el kiu formo konsistas tiuj, kiujn vi nomas kaj opinias Dioj? **2.** Ĉu la unua ne estas ŝtono, same kiel la pavimo surtretata, kaj alia — bronzo, ne pli bonkvalita ol la bronzaĵoj por nia ĉiutaga uzado, kaj tiu — ligno, eĉ jam putriĝanta, kaj jena — arĝento, bezonanta homon por prigardado, ke oni ĝin ne ŝtelu, kaj jena — fero, rustiĝinta, kaj jena ĉi — peco da argilaĵo, neniom pli valora ol tio, kion ni uzas por la plej hontinda servo? **3.** Ĉu ĉio ĉi ne estas el materio pasema? Ĉu ne forĝita per martelo kaj fajro? Ĉu ilin ne faris skulptisto, forĝisto, arĝentisto aŭ ceramikisto? Kaj antaŭ ol per ties artoscio ili estis modlitaj al sia nuna formo, ĉu ne ĉiu el ili estis — samkiel ankoraŭ nun! — transformebla al io alia? Kaj la vazoj kiujn ni nun posedas el la sama materio, ĉu — se la samajn fakulojn ili trafus — tiuj ne povus fariĝi similaj al ili? **4.** Kaj inverse, kion vi nun adoras, ĉu tion la homoj ne povus similigi al la ceteraĵoj? Ĉu ne ĉio ĉi sensensas? Ĉu ne blindas? Ĉu ne senanimas? Ĉu ne senperceptas? Ĉu ne senmovas? Ĉu ne ĉio ĉi putriĝas? Ĉu ne ĉio ĉi neniigas? **5.** Kaj tion vi nomas Dioj: al tiuj vi sklavas, tiujn vi adoras, kaj al tiuj finfine vi similiĝos! **6.** Kaj pro tio vi malamas la kristanojn, ĉar tiujn ili ne opinias Dioj. **7.** Sed ja, ĝuste dum vi opinias honori kaj kredi je ili, — ĉu vi ne multe pli malestimas ilin? Ĉu vi ne multe pli mokas kaj insultas ilin, se la ŝtonajn kaj ceramikajn vi adoras sen ke iu ilin gardas, dum la arĝentajn kaj orajn nokte vi enŝlosas kaj dumtage per gardoj ĉirkaŭas, por ke tiujn oni ne ŝtelu? — **8.** Kaj la aferojn, per kiuj vi kredas honori ilin...! Se ili perceptas, vi per tio ilin punas; sed se ili ne perceptas, nu — vi adoras ilin ja insultante per sango kaj haladzo!⁴ **9.** Iu ajn el vi foje provu elteni tion, suferu iu ajn ke tio estu farita al li! — Ne, neniu homo libervole suferos tian punon, ĉar li havas ja sensojn kaj intelekton; sed ŝtono ĝin eltenas, ja ĝi sensensas. Ĝiajn sensojn vi do punas. **10.** Pri tio, ke la kristanoj ne sklaviĝas al tiaj Dioj, multon mi povus ankoraŭ diri; sed se iu ne opinius sufiĉa la diritan, mi kredus sensenca pluparoli.

4 I.a. kontraŭ bruloferoj de buĉitaj bestoj kaj incenso.

III.1. Ἐξῆς δὲ περὶ τοῦ μὴ κατὰ τὰ αὐτὰ Ἰουδαίους θεοσεβεῖν αὐτοὺς οἶμαι σε μάλιστα ποθεῖν ἀκοῦσαι. **2.** Ἰουδαῖοι τοίνυν, εἰ μὲν ἀπέχονται ταύτης τῆς προειρημένης λατρείας, καλῶς θεὸν ἕνα τσν πάντων σέβειν καὶ δεσπότην ἀξιοῦσι φρονεῖν· εἰ δὲ τοῖς προειρημένοις ὁμοιοτρόπως τὴν θρησκείαν ροσάγουσιν αὐτῷ ταύτην, διαμαρτάνουσιν. **3.** ἅ γὰρ τοῖς ἀναισθήτοις καὶ κωφοῖς προσφέροντες οἱ Ἕλληνες ἀφροσύνης δεῖγμα παρέχουσι, ταῦθ' οὔτοι καθάπερ προσδεομένῳ τῷ θεῷ λογιζόμενοι παρέχειν μωρίαν εἰκὸς μᾶλλον ἤγοιτ' ἂν, οὐ θεοσέβειαν. **4.** ὁ γὰρ ποιήσας τὸν οὐρανὸν καὶ τὴν γῆν καὶ πάντα τὰ ἐν αὐτοῖς καὶ πᾶσιν ἡμῖν χορηγῶν, ὧν προσδεόμεθα, οὐδενὸς ἂν αὐτὸς προσδέοιτο τούτων ὧν τοῖς οἰομένοις δίδόναι παρέχει αὐτός. **5.** οἱ δέ γε θυσίας αὐτῷ δι' αἵματος καὶ κνίσης καὶ ταύταις ταῖς τιμαῖς αὐτὸν γεραίρειν, οὐδέν μοι δοκοῦσι διαφέρειν τῶν εἰς τὰ κωφὰ τὴν αὐτὴν ἐνδεικνυμένων φιλοτιμίαν· τῶν μὲν μὴ δυναμένοις τῆς τιμῆς μεταλαμβάνειν, τῶν δὲ δοκούντων παρέχειν τῷ μηδενὸς προσδεομένῳ.

refuto de la Judismo

III.1. Mi supozas, ke post tio ĉi vi precipe deziras aŭskulti, kial ili adoras Dion ne samkiel la Judoj. **2.** Nu, se la Judoj sindetenas de la ĵus menciita idoladoro kaj kultas nur unu Dion de la universo kaj kredas Lin Sinjoro, prave ili opinias tion ĝusta; sed se ili donas al Li sian kultadon sammaniere kiel per la ĵusdiritaĵoj, ili eraras. **3.** Ĉar se la grekoj pravas sian malsaĝon, oferante al [Dioj] senperceptaj kaj surdaj, tiuj ĉi, juĝante ke ili havigas ĝin al Dio, kvazaŭ Li bezonus ĝin, konsideru ĝin prefere stultaĵo ol Di-kultado. **4.** Ĉar "kiu kreis la ĉielon kaj la teron kaj ĉion en ili"⁵ kaj kiu al ni ĉiuj donacas tion, kion ni bezonas, tiu ja ne bezonas ion ajn el tio, kion Li mem havigas al kiuj opinias doni ĝin. **5.** Sed kiuj opinias oferi al Li per sango kaj haladzo kaj bruloferoj kaj kiuj honoras Lin per tiaj honoroj, laŭ mi neniom diferencas de tiuj, kiuj la saman honoradon plenumas por surdaĵoj: ĉar tiuj donas al kiuj ne povas ricevi la honoron, dum tiuj ĉi opinias havigi ĝin al kiu nenion bezonas.

5 Eliro 20:11, Agoj 14:15.

IV.1. Ἀλλὰ μὴν τό γε περὶ τὰς βρώσεις αὐτῶν ψοφοδεές καὶ τὴν περὶ τὰ σάββατα δεισιδαιμονίαν καὶ τὴν τῆς περιτομῆς ἀλαζονείαν καὶ τὴν τῆς νηστείας καὶ νομηνίας εἰρωνείαν, καταγέλαστα καὶ οὐδενὸς ἄξια λόγου, οὐ νομίζω σε χρῆζειν παρ' ἐμοῦ μαθεῖν. **2.** τό τε γὰρ τῶν ὑπὸ τοῦ θεοῦ κτισθέντα παραδέχεσθαι, ἃ δ' ὡς ἄχρηστα καὶ περισσὰ... **3.** παραιτεῖσθαι θεοῦ ὡς κωλύοντος ἐν τῇ τῶν σαββάτων ἡμέρᾳ καλόν τι ποιεῖν, πῶς οὐκ ἀσεβές; **4.** τὸ δὲ καὶ τὴν μείωσιν τῆς σαρκὸς μαρτύριον ἐκλογῆς ἀλαζονεύεσθαι ὡς διὰ τοῦτο ἐξαιρέτως ἠγαπημένους ὑπὸ θεοῦ, πῶς οὐ χλεύης ἄξιον; **5.** τὸ δὲ παρεδρεύοντας αὐτοὺς ἄστροις καὶ σελήνῃ τὴν παρατήρησιν τῶν μηνῶν καὶ τῶν ἡμερῶν ποιεῖσθαι καὶ τὰς οἰκονομίας θεοῦ καὶ τὰς τῶν καιρῶν ἀλλαγὰς καταδιαιεῖν πρὸς τὰς αὐτῶν ὀρμάς, ἃς μὲν εἰς ἐορτάς, ἃς δὲ εἰς πένθη· τίς ἂν θεοσεβείας καὶ οὐκ ἀφροσύνης πολὺ πλεόν ἠγήσαιτο δεῖγμα; **6.** τῆς μὲν οὖν κοινῆς εἰκαιότητος καὶ ἀπάτης καὶ τῆς Ἰουδαίων πολυπραγμοσύνης καὶ ἀλαζονείας ὡς ὀρθῶς ἀπέχονται Χριστιανοί, ἀρκούντως σε νομίζω μεμαθηκέναι· τὸ δὲ τῆς ἰδίας αὐτῶν θεοσεβείας μυστήριον μὴ προσδοκῆσης δύνασθαι παρὰ ἀνθρώπου μαθεῖν.

senutileco de la Judaj kutimoj

IV.1. Cetere, iliajn skrupulojn pri manĝaĵoj kaj ilian superstiĉon pri sabatoj kaj ilian orgojlon pri la cirkumcido kaj la ŝajnigon pri fastoj kaj novlunoj — ridindajn ja kaj ne priparolindajn! — mi opinias, ke vi ne bezonas ekscii tiujn de mi. **2.** Ĉar kiel ne estus malpie, akcepti kelkajn el la de Dio por homa utilo kreitaj aferoj, kiel bone kreitajn, sed forĵeti aliajn kiel senutilajn kaj superfluajn? **3.** Kiel estus ne sakrilegie, mensogi pri Dio, kvazaŭ Li malpermesus sabate fari ion bonan? **4.** Kiel ne meritus mokojn, orgojli pri mutilo de la karno⁶ kvazaŭ pri signo de elektiĝo, kvazaŭ pro tio ili estus speciale amataj de Dio? **5.** Kaj ke daŭre ili sekvas la stelojn kaj la lunon por percepti monatojn kaj tagojn, kaj ke ili analizas la gvidadon de Dio kaj la alternojn de la sorto laŭ *ties* moviĝoj — kelkaj kiel instigo al festado, aliaj por lukto: kiu prenis tion kiel signon de pieco kaj ne prefere de stulteco? **6.** Jen mi do supozas, ke sufiĉe vi sciiĝis, kiel prave ne nur de la ĝeneralaj vaneco kaj trompo, sed ankaŭ de la subtilemo kaj de la orgojlo de la Judoj sindetenas la kristanoj. Sed la misteron de ilia propra religio, — vi ne esperu ke vi ĝin povos ekscii de ajna homo...

6 La cirkumcidon malpermesis ĝuste Hadriano tial ĉar ĝi estas mutilo de la korpo.

V.1. Χριστιανοὶ γὰρ οὔτε γῆ οὔτε φωνῆ οὔτε ἔθεσι διακεκριμένοι τῶν λοιπῶν εἰσιν ἀνθρώπων. **2.** οὔτε γὰρ που πόλεις ἰδίας κατοικοῦσι οὔτε διαλέκτῳ τινὶ παρηλλαγμένη χρῶνται οὔτε βίον παράσημον ἀκοῦσιν. **3.** οὐ μὴν ἐπινοία τινὶ καὶ φροντίδι πολυπραγμόνων ἀνθρώπων μάθημα τοῦτ' αὐτοῖς ἐστὶν εὐρημένον, οὐδὲ δόματος ἀνθρωπίνου προεστᾶσιν, ὥσπερ ἔνιοι. **4.** κατοικοῦντες δὲ πόλεις ἑλληνίδας τε καὶ βαρβάρους, ὡς ἕκαστος ἐκληρώθη, καὶ τοῖς ἐγχωρίοις ἔθεσιν ἀκολουθοῦντες ἐν τε ἐσθῆτι καὶ διαίτῃ καὶ τῷ λοιπῷ βίῳ θαυμαστὴν καὶ ὁμολογουμένως παράδοξον ἐνδείκνυνται τὴν κατάστασιν τῆς ἑαυτῶν πολιτείας. **5.** πατρίδας οἰκοῦσιν ἰδίας, ἀλλ' ὡς οἰκοῦσιν ἰδίας, ἀλλ' ὡς πάροικοι μετέχουσι πάντων ὡς πολῖται, καὶ πάνθ' ὑπομένουσιν ὡς ξένοι· πᾶσα ξένη πατρίς ἐστὶν αὐτῶν, καὶ πᾶσα πατρίς ξένη. **6.** γαμοῦσιν ὡς πάντες, τεκνογονοῦσιν· ἀλλ' οὐ ῥίπτουσι τὰ γεννώμενα. **7.** τράπεζαν κοινὴν παρατίθενται, ἀλλ' οὐ κοίτην. **8.** ἐν σαρκὶ τυγχάνουσιν, ἀλλ' οὐ κατὰ σάρκα ζῶσιν. **9.** ἐπὶ γῆς διατρίβουσιν, ἀλλ' ἐν οὐρανῷ πολιτεύονται. **10.** πείθονται τοῖς ὠρισμένοις νόμοις, καὶ τοῖς ἰδίοις βίοις νικῶσι τοὺς νόμους. **11.** ἀγαπῶσι πάντας, καὶ ὑπὸ πάντων διώκονται. **12.** ἀγνοοῦνται, καὶ τατακρίνονται· θανατοῦνται, καὶ ζωοποιοῦνται. **13.** πτωχεύουσι, καὶ πλουτίζουσι πολλοὺς· πάντων ὑστεροῦνται, καὶ ἐν πᾶσι περισσεύουσιν. **14.** ἀτιμοῦνται, καὶ ἐν ταῖς ἀτιμίαις δοξάζονται. βλασφημοῦνται, καὶ δίκαιοῦνται. **15.** λοιδοροῦνται, καὶ εὐλογοῦσιν· ὑβρίζονται, καὶ τιμῶσιν. **16.** ἀγαθοποιοῦντες ὡς κακοὶ κολάζονται· κολαζόμενοι χαίρουσιν ὡς ζωοποιούμενοι. **17.** ὑπὸ Ἰουδαίων ὡς ἀλλόφυλοι πολεμοῦνται καὶ ὑπὸ Ἑλλήνων διώκονται καὶ τὴν αἰτίαν τῆς ἔχθρας εἰπεῖν οἱ μισοῦντες οὐκ ἔχουσιν.

paradoksoj kristanaj

V.1. Ĉar la kristanoj nek teritorie nek lingve nek more distingiĝas disde la ceteraj homoj; **2.** ĉar ili nek proprajn urbojn enloĝas, nek lingvaĵon fremdan uzas, nek vivon okulfrape alian vivas. **3.** Ne ja per talento aŭ spekulacio de homoj subtilemaj estis eltrovita por ili ĉi tiu doktrino, kaj ili ankaŭ ne konfesas iun dogmon homfaritan, kiel faras kelkaj aliaj. **4.** Sed loĝante urbojn Helenajn kaj barbarajn, ĉiu laŭ sia sorto, kaj obeante la enlandajn kutimojn rilate al vestaĵo, manĝaĵo, k.t.p., ili montras mirindan kaj komunopinie paradoksan konduton civitan: **5.** ili loĝas siajn proprajn patriojn, sed kvazaŭ eksterlandanoj; ili partoprenas en ĉio kiel civitanoj, — kaj simple ĉion toleras kvazaŭ fremduloj; ĉio fremda estas por ili patrio, kaj la patrio — io fremda. **6.** Ili geedziĝas kiel ĉiuj, ili infangeneras; sed la generitan ili ne elmetas. **7.** Sian tablon ili komunigas kun aliaj, sed ne sian liton. **8.** En la karno ili estas, sed ili ne vivas laŭ la karno.⁷ **9.** Surtere ili sian tempon pasigas, sed enĉiele ili havas civitanecon. **10.** Ili obeas la fiksitajn leĝojn kaj per sia vivostilo ili superas la leĝojn. **11.** Ĉiujn ili amas, kaj de ĉiuj ili estas persekutataj. **12.** Ne konas oni ilin, kaj ilin kondamnas: oni mortigas ilin, kaj ili viviĝas.⁸ **13.** “Ili almozpetas kaj riĉigas multajn”:⁹ ĉion ili malhavas, kaj je ĉio ili riĉegas. **14.** Oni malhonoras ilin, kaj en la malhonoroj ili gloras. Oni insultas ilin, kaj oni opinias ilin justaj. **15.** “Oni mokinsultas ilin kaj ili benas”:¹⁰ oni mistraktas ilin kaj ili honoras. **16.** Bonfarante, ili estas punataj kiel aĉuloj; punate, ili ĝojas kvazaŭ oni donus al ili la vivon. **17.** La Judoj ilin atakas — kvazaŭ aligentanojn, kaj la Helenoj persekutas ilin. Kaj kiuj malamas ilin, tiuj ne povas diri la kialon de sia malamo.

⁷ Laŭ la karno = Laŭ homa kutimo.

⁸ Vidu en: Tertuliano — *Apologio*, ĉap. 1 (Voĉoj Kristanaj 2) .

⁹ II Kor. 6:10.

¹⁰ I Kor. 4:12.

VI.1. Ἀπλῶς δ' εἰπεῖν, ὅπερ ἐστὶν σῶματι ψυχῇ, τοῦτ' εἰσὶν ἐν κόσμῳ Χριστιανοί. **2.** ἔσπαρται κατὰ πάντων τῶν τοῦ σώματος μελῶν ἡ ψυχῇ, καὶ Χριστιανοὶ κατὰ τὰς τοῦ κόσμου πόλεις. **3.** οἰκεῖ μὲν ἐν τῷ ἐν τῷ σώματι ψυχῇ, οὐκ ἔστι δὲ ἐκ τοῦ σώματος· καὶ Χριστιανοὶ ἐν κόσμῳ οἰκοῦσιν, οὐκ εἰσὶ δὲ ἐκ τοῦ κόσμου. **4.** ἀόρατος ἡ ψυχῇ ἐν ὄρατῷ φρουρεῖται τῷ κόσμῳ, ἀόρατος δὲ αὐτῶν ἡ θεοσέβεια μένει. **5.** μισεῖ τὴν ψυχῇ ἢ σὰρξ καὶ πολεμεῖ μηδὲν ἀδικουμένη, διότι ταῖς ἡδοναῖς κωλύεται· μισεῖ καὶ Χριστιανούς ὁ κόσμος μηδὲν ἀδικούμενος, ὅτι ταῖς ἡδοναῖς ἀντιτάσσονται. **6.** ἡ ψυχῇ τὴν μισοῦσαν ἀγαπᾷ σάρκα καὶ τὰ μέλη· καὶ Χριστιανοὶ τοὺς μισοῦντας ἀγαπῶσιν. **7.** ἐγκέκλεισται μὲν ἡ ψυχῇ τῷ σώματι, συνέχει δὲ αὐτὴ τὸ σῶμα· καὶ Χριστιανοὶ κατέχονται μὲν ὡς ἐν φρουρᾷ τῷ κόσμῳ, αὐτοὶ δὲ συνέχουσι τὸν κόσμον. **8.** ἀθάνατος ἡ ψυχῇ ἐν θνητῷ σκηνώματι κατοικεῖ· καὶ Χριστιανοὶ παροικοῦσιν ἐν φθαρτοῖς, τὴν ἐν οὐρανοῖς ἀφθαρσίαν προσδεχόμενοι. **9.** κακουργουμένη σιτίοις καὶ ποτοῖς ἡ ψυχῇ βελτιοῦται· καὶ Χριστιανοὶ κολαζόμενοι καθ' ἡμέραν πλεονάζουσι μᾶλλον. **10.** εἰς τοαύτην αὐτοὺς τάξιν ἔθετο ὁ θεός, ἣν οὐ θεμιτὸν αὐτοῖς παραιτήσασθαι.

la kristanaro kiel "animo de la mondo"

VI.1. Por diri simple: kio estas la animo en la korpo, tio estas la kristanoj en la mondo. **2.** La animo estas dividita tra ĉiuj membroj de la korpo, kaj la kristanoj tra ĉiuj urboj de la mondo. **3.** La animo loĝas en la korpo, sed ne estas el la korpo; kaj la kristanoj loĝas en la mondo, sed ne estas el la mondo. **4.** La nevidebla animo estas gardata en la korpo videbla; kaj la kristanojn oni konas kiel estantajn en ĉi mondo, sed ilia religio restas nevidebla. **5.** La karno malamas la animon kaj ĝi militas je ĝi, kvankam nenion ĝi suferis de ĝi, nur ĉar ĝi prohibas uzi la ĝuojn; la mondo ankaŭ malamas la kristanojn, kvankam ĝi nenion suferis de ili, — nur ĉar ili kontraŭas la ĝuojn. **6.** La animo amas la malamantajn karnon kaj membrojn; ankaŭ la kristanoj amas la malamantojn. **7.** La animo estas enŝlosita en la korpo, sed ĝi kun-tenas la korpon; ankaŭ la kristanoj estas tenataj en la mondo kvazaŭ en karcero, sed ili kun-tenas la mondon.¹¹ **8.** La senmorta animo loĝas en sia mortema tendo; ankaŭ la kristanoj fremdule loĝas en la pereonta, sed ili atendas la nepereontan en la ĉieloj. **9.** Mistraktate de manĝoj kaj drinkado, la animo tamen progresas; ankaŭ la kristanoj, ĉiutage punate, plu plinombriĝas. **10.** Sur tian postenon lokis ilin Dio, kaj ili ne rajtas forlasi ĝin.

11 Vidu en: Tertuliano — *Al la Martiroj* (en ĉi serieto, aperonta).

VII.1. Οὐ γὰρ ἐπίγειον, ὡς ἔφην, εὕρημα τοῦτ' αὐτοῦς παρεδόθη, οὐδὲ θνητὴν ἐπίνοιαν φυλάσσειν οὕτως ἀξιοῦσιν ἐπιμελῶς, οὐδὲ ἀνθρωπίνων οἰκονομίαν μυστηρίων πεπίστευνται. **2.** ἀλλ' αὐτὸς ἀληθῶς ὁ παντοκράτωρ καὶ παντοκτίστης καὶ ἀόρατος θεός, αὐτὸς ἀπ' οὐρανῶν τὴν ἀλήθειαν καὶ τὸν λόγον τὸν ἅγιον καὶ ἀπερινόητον ἀνθρώποις ἐνίδρυσε καὶ ἐγκατεστήριξε ταῖς καρδίαις αὐτῶν· οὐ, καθάπερ ἂν τις εἰκάσειεν, ἀνθρώποις ὑπηρέτην τινὰ πέμψας ἢ ἄγγελον ἢ ἄρχοντα ἢ τινα τῶν διεπόντων τὰ ἐπίγεια ἢ τινα τῶν πεπιστευμένων τὰς ἐν οὐρανοῖς διοικήσεις, ἀλλ' αὐτὸν τὸν τεχνίτην καὶ δημιουργὸν τῶν ὅλων, ᾧ τοὺς οὐρανοὺς ἔκτισεν, ᾧ τὴν θάλασσαν ἰδίῳς ἐνέκλεισεν, οὗ τὰ μυστήρια πιστῶς πάντα φυλάσσει τὰ στοιχεῖα, παρ' οὗ τὰ μέτρα τῶν τῆς ἡμέρας δρόμων ὁ ἥλιος εἴληφε φυλάσσειν, ᾧ πειθαρχεῖ τὰ ἄστρα τῷ τῆς σελήνης ἀκολουθοῦντα δρόμῳ· ᾧ πάντα διατέτακται καὶ διώρισται καὶ ὑποτέτακται, οὐρανοὶ καὶ τὰ ἐν οὐρανοῖς, γῆ καὶ τὰ ἐν τῇ θάλασσᾳ καὶ τὰ ἐν τῇ θαλάσῃ, πῦρ, ἀήρ, ἄβυσσος, τὰ ἐν ὑψέσι, τὰ ἐν βάθεσι, τὰ ἐν τῷ μεταξύ· τοῦτον πρὸς αὐτοὺς ἀπέστειλεν. **3.** . . . **4.** ἄρᾳ γε, ὡς σώζων ἔπεμψεν, ὡς πείθων, οὐ βιαζόμενος· βία γὰρ οὐ πρόσεστι τῷ ὡς ἀγαπῶν, οὐ κρίνων. **5.** . . . **6.** πέμψει γὰρ αὐτὸν κρίνοντα· καὶ τίς αὐτοῦ τὴν παρουσίαν ὑπουσίαν ὑποστήσεται; . . .

7. . . . παραβαλλομένους θηρίοις, ἵνα ἀρνήσωνται τὸν κύριον, καὶ μὴ νικωμένους; **8.** οὐχ ὄρας, ὅσῳ πλείονες κολάζονται, τοσοῦτῳ πλεονάζοντας ἄλλους; **9.** ταῦτα ἀνθρώπου οὐ δοκεῖ τὰ ἔργα· ταῦτα δύνάμις ἐστὶ θεοῦ ταῦτα τῆς παρουσίας αὐτοῦ δείγματα.

Dia origino de la kristanismo

VII.1. Ĉar, kiel mi diris, tio ĉi estis transdonita al ili ne kiel homa inventaĵo, kaj ili ankaŭ ne trovis iun ajn homfaritan ideon inda je tiel profunda obero, kaj oni ankaŭ ne konfidis al ili la administradon de terecaj misteroj. **2.** Sed kiu envere estas la ĉioreganta kaj ĉiokreinta kaj nevidebla Dio, tiu do el la ĉieloj enmetis en la homojn la veron kaj sian parolon sanktan kaj ne ĝisfunde kompreneblan, kaj Li firmigis ĝin en iliaj koroj; ne, kiel iu eventuale povus pensi, ke Li sendis al la homoj iun sian servanton aŭ anĝelon aŭ princon aŭ iun ajn el la regantoj de ĉi mondo aŭ iun el tiuj, kiuj prizorgas la administradon en la ĉieloj, sed la Artiston mem, la kreinton de la tuto, per kiu Li kreis la ĉielojn, per kiu Li limigis la maron en propraj limoj: tiun do, kies misteron fidele gardas ĉiuj elementoj, de kiu la suno ricevis por obei la mezurojn de la tagaj vojoj, al kiu pretas obei la luno por — laŭordone — nokte lumi, al kiu emas sekvi la steloj, la ĉeularo de la luno en ties vojaĝo; — de kiu ĉio estis ordigita, difinita kaj submetita: la ĉieloj kaj ĉio en la ĉieloj, la tero kaj ĉio sur la tero, la maro kaj ĉio en la maro, la fajro, la aero, la abismo, ĉio en la altoj, ĉio en la profundoj, ĉio inter ambaŭ: tiun do Li sendis al ili. **3.** Ĉu eble, kiel nun povus supozi iu: ĉu por esti tirano, por timigi, por mirigi ilin? **4.** Tute ne! Sed en dolĉeco kaj mildo Li sendis lin, kiel reĝo sendanta sian reĝan filon, Li sendis lin al la homoj kiel [...], Li sendis lin, kiel savanto, kiel konvinkanto, ne kiel iu, kiu devigas; ĉar devigo ne decas Dion.¹² **5.** Li sendis lin, kiel vokanto, ne kiel persekutanto; Li sendis kiel amanto, ne kiel juĝanto, **6.** *Lin* Li ja re-sendos por juĝi: kaj kiu tiam kontraŭstaros lian Venon?

unua lakuno

7. [Ĉu vi ne vidas] ilin antaŭmetitaj al la bestioj, por ke la Sinjoron ili negu, sed tamen ili restas nevenkeblaj? **8.** Ĉu vi ne vidas: ju pli ili estas punbatataj, des pli nombriĝas la novuloj! **9.** Tion vi ne kredu verko de homo: tio ja estas povo de Dio: tio estas signo de lia Venon.

12 Oni bone atentu la kazojn: Li sendis kiel (sendas) savanto... ktp.

VIII.1. Τίς γὰρ ὅλως ἀνθρώπων ἡπίστατο, τί ποτ' ἐστὶ θεὸς πρὶν αὐτὸν ἐλθεῖν; **2.** ἢ τοῦς κενοὺς καὶ ληρώδεις ἐκείνων λόγους ἀποδέχη τῶν ἀξιοπίστων φιλοσόφων, ὧν οἱ μὲν τινες πῦρ ἔφασαν εἶναι τὸν θεὸν (οὗ μέλλουσι χωρήσειν αὐτοί, τοῦτο καλοῦσι θεόν), οἱ δὲ ὕδωρ, οἱ δ' ἄλλο τι τῶν στοιχείων τῶν ἐκτισμένων ὑπὸ θεοῦ; **3.** καίτοι γε, εἴ τις τούτων τῶν λόγων ἀποδεκτός ἐστι, δύανιτ' ἂν καὶ τῶν λοιπῶν κτισμάτων ἐν ἐν ἕκαστον ὁμοίως ἀπροφαίνεσθαι θεό. **4.** ἀλλὰ ταῦτα μὲν τερατεία καὶ πλάνη τῶν γοήτων ἐστίν· **5.** ἀνθρώπων δὲ οὐδεὶς οὔτε εἶδεν οὔτε ἐγνώρισεν, αὐτὸς δὲ ἑαυτὸν ἐπέδειξεν. **6.** ἐπέδειξε δὲ διὰ πίστεως, ἥ μόνη θεὸν ἰδεῖν συγκεχώρηται. **7.** ὁ γὰρ δεσπότης καὶ δημιουργὸς τῶν ὅλων θεός, ὁ ποιήσας τὰ πάντα καὶ κατὰ τάξιν διακρίνας, οὐ μόνον φιλόανθρωπος ἐγένετο, ἀλλὰ καὶ μακρόθυμος. **8.** ἀλλ' οὗτος ἦν μὲν ἀεὶ τοιοῦτος καὶ ἔστι, χρηστός καὶ ἀγαθὸς καὶ ἀόργητος καὶ ἀληθής, καὶ μόνος ἀγαθός ἐστιν·

9. . . . 10. ἐννοήσας δὲ μεγάλην καὶ ἀφραστον ἔννοιαν οὖν κατεῖχεν ἐν μυστηρίῳ καὶ διετηρεῖ τὴν σοφὴν αὐτοῦ βουλήν, ἀμελεῖν ἡμῶν καὶ ἀφροντιστεῖν ἐδόκει· **11.** ἐπεὶ δὲ ἀπεκάλυψε διὰ τοῦ ἀγαπητοῦ παιδὸς καὶ ἐφανερώσε τὰ ἐξ ἀρχῆς ἡτοιμασμένα, πάνθ' ἅμα παρέσχεν ἡμῖν καὶ μετασχεῖν τῶν εὐεργεσιῶν αὐτοῦ καὶ ἰδεῖν καὶ νοῆσαι, ἃ τίς ἂν πώποτε προσεδόκησεν ἡμῶν;

Dio manifestita en la enkarniĝo

VIII.1. Ĉar kiu el la homoj tutplene sciis, *kio* do vere estas Dio, antaŭ ol *li* venis? **2.** Aŭ ĉu vi akceptas la vanajn kaj stultajn dirojn de tiuj “fidindaj” filozofoj, el kiuj kelkaj nomas la fajron Dio (tien ili mem devus iri, ĉar ĝin ili titolas Dio!), aliaj la akvon, refoje aliaj iun alian el la elementoj kreitaj de Dio!? **3.** Sendube ja: se iu el ĉi tezoj estus akceptebla, — kiu ajn de la ceteraj kreaĵoj povus same bone montriĝi esti Dio! **4.** Sed ĉi tio estas nuraj mirrakontoj kaj trompo far malveristoj. **5.** Neniu homo vidis aŭ ekkonis Dion, sed mem Li sin konigis. **6.** Sed Li konigis per la fido, kiu estas la nura, per kiu eblas vidi Dion. **7.** Ĉar la sinjoro kaj kreinto de la universo, Dio, kiu faris ĉion kaj laŭorde distingis, ne nur montriĝis hom-ama sed ankaŭ indulgema. **8.** Sed envere Li ĉiam estis tia, kaj estas kaj estos, bonkora, kaj bona, kaj ne koleriĝema, kaj Li sola estas bona.

9. Elpensinte grandan kaj neeldireblan intencon, Li komunikis ĝin nur al sia filo. **10.** Nu do, dum Li tenis ĝin sub sekreto kaj kaŝis sian saĝan planon, ŝajne Li nek zorgis nek pensis pri ni; **11.** sed kiam Li malkaŝis ĝin per sia amata filo kaj manifestis ĉion, kion dekomence Li preparis, samtempe ĉion Li donis al ni: ne nur ke ni partoprenu je liaj bonfaroj, sed ankaŭ ke ni vidu kaj konu Lin: kaj kiu el ni iam ajn povis esperi tion?

ΙΧ.1. Πάντ' οὖν ἤδη παρ' ἑαυτῷ σὺν τῷ παιδί οὐκονομηκῶς, μέχρι μὲν τοῦ πρόσθεν χρόνου εἶασεν ἡμᾶς, ὡς εβουλόμεθα, ἀτάκτοις φοραῖς φέρεσθαι, ἡδοναῖς καὶ ἐπιθυμίαις ἀπαγομένους. οὐ πάντως ἐφηδόμενος τοῖς ἀμαρτήμασιν ἡμῶν, ἀλλ' ἀνεχόμενος, οὐδὲ τῷ τότε τῆς ἀδικίας καιρῷ συνευδοκῶν, ἀλλὰ τὸν νῦν τῆς δικαιοσύνης δημιουργῶν, ἵνα ἐν τῷ τότε χρόνῳ ἐλεγχθέντες ἐκ τῶν ἰδίων ἔρων ἀνάξιοι ζωῆς νῦν ὑπὸ τῆς τοῦ θεοῦ χρηστότητος ἀξιωθῶμεν, καὶ τὸ καθ' ἑαυτοὺς φανερώσαντες ἀδύνατον εἰσελθεῖν εἰς τὴν βασιλείαν τοῦ θεοῦ τῇ δυνάμει τοῦ θεοῦ δυνατοὶ γενηθῶμεν. **2.** ἐπεὶ δὲ πεπλήρωτο μὲν ἡ ἡμετέρα ἀδιδία καὶ τελείως πεφανέρωτο, ὅτι ὁ μισθὸς αὐτῆς κόλασις καὶ θάνατος προσεδοκᾶτο, ἦλθε δὲ ὁ καιρὸς, ὃν θεὸς πρέθετο λοιπὸν φανερῶσαι τὴν ἑαυτοῦ χρηστότητα καὶ δύναμιν (ὧ τῆς υπερβαλλούσης φιλανθρωπίας καὶ ἀγάπης τοῦ θεοῦ), οὐκ ἐμίσησεν ἡμᾶς οὐδὲ ἀπώσατο οὐδὲ ἐμνησικάκησεν, ἀλλὰ ἐμακροθύμησεν, ἠνέσχετο, ἐλεῶν αὐτὸς τὰς ἡμετέρας ἀμαρτίας ἀνεδέξατο, αὐτὸς τὸν ἴδιον υἱὸν ἀπέδοτο λύτρον ὑπὲρ ἡμῶν, τὸν ἅγιον ὑπὲρ ἀνόμων, τὸ ἄκακον ὑπὲρ τῶν κακῶν, τὸν δίκαιον ὑπὲρ τῶν ἀδίκων, τὸν ἀφθαρτον ὑπὲρ τῶν θνητῶν. **3.** τί γὰρ ἄλλο τὰς ἀμαρτίας ἡμῶν ἠδυνήθη καλύψαι ἢ ἐκεῖνου δικαιοσύνη; **4.** ἐν τίνι δικαιωθῆναι δυνατόν τοὺς ἀνόμους ἡμᾶς καὶ ἀσεβεῖς ἢ ἐν μόνῳ τῷ υἱῷ τοῦ θεοῦ; **5.** ὧ τῆς γλυκείας ἀνταλλαγῆς, ὧ τῆς ἀνεξιχνιάστου δημιουργίας, ὧ τῶν ἀπροσδοκῆτων εὐεργεσιῶν ἵνα ἀνομία μὲν πολλῶν ἐν δικαίῳ ἐνὶ κρυβῆ, δικαιοσύνη δὲ ἐνὸς πολλοὺς ἀνόμους δικαιώσῃ. **6.** ἐλέγξας οὖν ἐν μὲν τῷ πρόσθεν χρόνῳ τὸ ἀδύνατον τῆς ἡμέτερας φύσεως εἰς τὸ τυχεῖν ζωῆς, νῦν δὲ τὸν σωτῆρα δείξας δυνατόν σώζειν καὶ τὰ ἀδύνατα, ἐξ ἀμφοτέρων ἐβουλήθη πιστεύειν ἡμᾶς τῇ χρηστότητι αὐτοῦ, αὐτὸν ἠγεῖσθαι τροφέα, πατέρα, διδάσκαλον, σύμβουλον, ἱατρόν, νοῦν, φῶς, τιμὴν, δόξαν, ἰσχύν, ζωὴν, περὶ ἐνδύσεως καὶ τροφῆς μὴ μεριμνᾶν.

kiamaniere Dio antaŭdestinis ĉion

IX.1. Ĉion do jam anticipi fiksinte ĉe si mem, kune kun sia filo, ĝis antaŭ tre mallonge Li lasis nin drivi, laŭ nia deziro, je senordaj impulsoj, direktatajn de ĝuoj kaj deziroj. Li tute ne trovis plezuron en niaj pekoj, sed suferis ilin, ankaŭ ne aprobis tiun tempon de maljusteco, sed preparis la nunan justecon, por ke, tiutempe per niaj propraj agoj pruvite malindaj je vivo, ni nun fariĝu indaj pro la mildeco de Dio, kaj por ke, post kiam montriĝis maleble propraprove eniri la regnon de Dio, per la forto de Dio ni ricevu la eblon eniri.

2. Kaj kiam pleniĝis nia maljusteco kaj plene videbliĝis, ke kiel ties sola repago estas atendeblaj puno kaj morto, jen venis la momento, kiun antaŭfiksas Dio por plue videbliĝi al ni lian bonkorecon kaj forton (ho, la grandioza homamo kaj bonvolemo de Dio!), kaj Li nek malamamis nin nek forpuŝis nin, nek memortenis nian malbonon, sed Li indulgis, Li eltenis nin, — kaj pro kompatemo Li mem surpronis niajn pekojn, Li mem “foroferis sian propran filon”¹³ kiel elaçeton pro ni: la sanktan pro pekuloj, la senkulpan pro kulpuloj, “la justan pro maljustaj”,¹⁴ la nepereontan pro pereemaj, la senmortan pro mortidevaj.

3. Ĉar kio alia kapablas kovri niajn pekojn, krom lia justeco? **4.** Per kiu alia ni povus justiĝi — ni senjustaj kaj malpiaj — krom per la unika filo de Dio? **5.** Ho dolĉa interŝanĝo! Ho nekomprenebla verko! Ho neatenditaj bonfaroj! Ke maljusteco de multaj kovriĝu dank’ al unusola justulo! Ke la justeco de unusola justigus multajn maljustajn! **6.** Ĉar Dio konvinkis nin en la pasinteco, ke neblas, ke nia naturo atingu la vivon, kaj ĉar Li indikis la savanton, kiu povas savi eĉ la neblaĵon, Li do esperis, ke pro ambaŭ ĉi faktoj ni fidu je lia boneco, ke ni rigardu Lin nia subtenanto, nia patro, instruisto, konsilanto, kuracisto, intelekto, lumo, honoro, gloro, forto kaj vivo, kaj ke ni ne zorgu pri vestaĵoj aŭ pri manĝaĵoj.

13 Rom. 8:32.

14 I Petr. 3:18.

Χ.1. Ταύτην καὶ σὺ τὴν πίστιν ἂν ποθύσης, καὶ λάβης πρῶτον μὲν ἐπίνωσιν πατρός **2.** ὁ γὰρ θεὸς τοὺς ἀνθρώπους ἠγάπησε, δι' οὓς ἐποίησε τὸν κόσμον, οἷς ὑπέταξε πάντα τὰ ἐν τῇ γῆ, οἷς λόγον ἔδωκεν, οἷς νοῦν, οἷς μόνοις ἄνω πρὸς αὐτὸν ὁρᾶν ἐπέτρεψεν, οὓς ἐκ τῆς ἰδίας εἰκόνας ἔπλασε, πρὸς οὓς ἀπέστειλε τὸν υἱὸν αὐτοῦ τὸν μονογενῆ, οἷς τὴν ἐν οὐρανῷ βασιλείαν ἐπηγγείλατο, καὶ δώσει τοῖς ἀγαπήσασιν αὐτόν.

3. ἐπιγνοὺς δὲ τίνος οἶει πληρωθήσεσθαι χαρᾶς; ἢ πῶς ἀγαπήσεις τὸν οὕτως προαγαπήσαντά σε; **4.** ἀγαπήσας δὲ μιμητῆς ἔση αὐτοῦ τῆς χρηστότητος. καὶ μὴ θαυμάσης, εἰ δύναται θέλοντος αὐτοῦ. **5.** οὐ γὰρ τὸ καταδυναστεύειν τῶν πλησίων οὐδὲ τὸ πλέον ἔχειν βούλεσθαι τῶν ἀσθενεστέρων οὐδὲ τὸ πλουτεῖν καὶ βιάζεσθαι τοὺς ὑποδεεστέρους εὐδαιμονεῖν ἐστίν, οὐδὲ ἐν τούτοις δύναται τις μιμήσασθαι θεόν, ἀλλὰ ταῦτα ἐκτὸς τῆς ἐκείνου μεγαλειότητος.

6. ἀλλ' ὅστις τὸ τοῦ πλησίου ἀναδέχεται βάρος, ὃς ἐν ᾧ κρείσσων ἐστὶν ἕτερον τὸν ἐλαττούμενον εὐεργετεῖν ἐθέλει, ὃς ἂ παρὰ τοῦ θεοῦ λαβὼν ἔχει, ταῦτα τοῖς ἐπιδομένοις χορηγῶν θεὸς γίνεται τῶν λαμβανόντων, οὗτος μιμητῆς ἐστὶ θεοῦ.

7. τότε θεᾶση τυγχάνων ἐπὶ τῆς γῆς, ὅτι θεὸς ἐν οὐρανοῖς πολιτεύεται, τότε μυστήρια θεοῦ λαλεῖν ἄρξη, τότε τοὺς κολαζομένους ἐπὶ τῷ μὴ θέλῃν ἀρνήσασθαι θεὸν καὶ ἀγαπήσεις καὶ θαυμάσεις· τότε τῆς ἀπάτης τοῦ κόσμου καὶ τῆς πλάνης καταγνώση, ὅταν τὸ ἀληθῶς ἐν οὐρανῷ ζῆν ἐπιγνῶς, ὅταν τοῦ δοκοῦντος ἐνθάδε θανάτου καταφρονήσης, ὅταν τὸν ὄντως θάνατον φοβηθῆς, ὃς φυλάσσεται τοῖς κατακριθησομένοις εἰς τὸ πῦρ τὸ αἰώνιον, ὃ τοὺς παραδοθέντας αὐτῷ μέχρι τέλους κολάσει. **8.** τότε τοὺς ὑπομένοντας ὑπὲρ δικαιοσύνης θαυμάσεις τὸ πῦρ τὸ πρόσκαιρον καὶ μακαρίσεις, ὅταν ἐκεῖνο τὸ πῦρ ἐπιγνῶς.

la amo: esenco de la nova religio

X.1. Se ankaŭ vi nun ekdeziras tian fidon, do unue vi ricevu konon pri la Patro. **2.** Ĉar Dio la homojn amis; pro ili Li kreis la mondon; al ili Li donis la parolon, la intelekton; Li permesis ilin suprenrigardi al Li; Li formis ilin laŭ sia bildo; Li “sendis al ili sian unikan filon”;¹⁵ Li promesis al ili la Regnon en la ĉielo, kiun Li donos al ĉiuj, kiuj Lin amas.

3. Ĉar nun vi konas Lin, — per kiu graco vi pensas, ke vi pleniĝos? Kiamaniere vi re-amos Lin, kiu unua vin tiom amis? **4.** Amante, vi estos imitanto de lia boneco. Kaj ne miru, ke homo povas esti imitanto de Dio; se Dio ĝin volas, la homo povas. **5.** Ĉar nek subpremado de la proksimuloj nek la deziro superi la malpli fortajn, nek riĉeco, nek perforto al senhavuloj estas la feliĉo: — tiamaniere ne eblas imiti Dion, sed ĉio ĉi kuŝas ekster lia grandiozeco.

6. Sed kiu surprenas sur sin la ŝarĝon de la proksimulo; kiu pretas bonfari al sia malsuperulo ĝuste tiutere kie li mem estas supera; kiu fariĝas Dio por la ricevantoj, disponigante al la bezonantoj tion, kion li mem posedas kiel Di-donitaĵon: tiu ja estas imitanto de Dio.

7. Tiam, ankoraŭ estante surtere, vi vidos, ke Dio reĝas en la ĉeloj: tiam vi komencos paroli la misterojn de Dio: tiam vi amos kaj samtempe admiros tiujn, kiuj kondamniĝis pro la negado nei Dion: tiam vi klare perceptos la sintrompon kaj la devojiĝon de la mondo, kiam vi ekkonos, kio estas vere vivi en la ĉielo; kiam vi malŝatos, kio tie ĉi estas konsiderata kiel morto; kiam vi timos, kio ververe estas la morto kiu atendas tiujn, kiuj estos kondamnitaj en la fajron eternan, kiu turmentos tiujn, kiuj estos transdonitaj al ĝi, ĝis la fino. **8.** Kiam vi konos tiun fajron, vi admiros kaj benos tiujn, kiuj pro la justeco eltenas la fajron paseman.

dua lakuno

15 I Joh. 4:9.

ΧΙ.1. Οὐ ξένα ὁμιλῶ οὐδὲ παραλόγως ζητῶ, ἀλλὰ ἀποστόλων γενόμενος μαθητῆς γίνομαι διδάσκαλος ἔθνων· τὰ παραδοθέντα ἀξίως ὑπηρετῶ γινομένοις ἀληθείας μαθηταῖς. **2.** τίς γὰρ ὀρθῶς διδαχθεὶς καὶ λόγῳ προσφιλεῖς γενηθεὶς οὐκ ἐπιζητεῖ σαφῶς μαθεῖν τὰ διὰ λόγου δειχθέντα φανερώς μαθηταῖς, οἷς ἐφανέρωσεν ὁ λόγος φανείς, παρησία λαλῶν, ὑπὸ ἀπίστων μὴ νοούμενος, μαθηταῖς δὲ διηγούμενος, οἱ πιστοὶ λογισθέντες ὑπ' αὐτοῦ ἔγνωσαν πατρὸς μυστήρια; **3.** οὗ χάριν ἀπέστειλε λόγον, ἵνα κόσμῳ φανῆ,

ὅς ὑπὸ λαοῦ ἀτιμασθεὶς, διὰ ἀποστόλων κηρυχθεὶς, ὑπὸ ἔθνων ἐπιστεύθη. **4.** οὗτος ὁ ἀπ' ἀρχῆς, ὁ καινὸς φανείς καὶ παλαιὸς εὐρεθεὶς καὶ πάντοτε νέος ἐν ἀγίων καρδίαις γεννώμενος. **5.** οὗτος ὁ αἰεὶ, ὁ σήμερον υἱὸς λογισθεὶς, δι' οὗ πλουτίζεται ἡ ἐκκλησία καὶ χάρις ἀπλουμένη ἐν ἀγίοις πληθύνεται, παρέχουσα νοῦν, φανεροῦσα μυστήρια, διαγγέλουσα καιροὺς, χαίρουσα ἐπὶ πιστοῖς, ἐπιζητοῦσι δωρομένη, οἷς ὅρια πίστεως οὐ θραύεται οὐδὲ ὅρια πατέρων παρορίζεται. **6.** εἶτα φόβος νόμου ἄδεται, καὶ προφητῶν χάρις γινώσκεται, καὶ εὐαγγελίων πίστις ἴδρυται, καὶ ἀποστόλων παράδοσις φυλάσσεται, καὶ ἐκκλησίας χάρις σκιρτᾷ.

7. ἦν χάριν μὴ λυπῶν ἐπιγνώση, ἃ λόγος ὁμιλεῖ δι' ὧν βούλεται, ὅτε θέλει. **8.** ὅσα γὰρ θελήματι τοῦ κελεύοντος λόγου ἐκινήθημεν ἐξαιρεῖν μετὰ πόνου, ἐξ ἀγάπης τῶν ἀποκαλυφθέντων ἡμῖν γινόμεθα ὑμῖν κοινωνοί.

epilogo

XI.1. Mi ne parolas fremdaĵojn nek serĉas absurdon, sed estinte disĉiplo de la apostoloj mi nun mem fariĝas instruanto de la popoloj; mi nur transdonas la konfidaĵon al tiuj, kiuj fariĝis indaj disĉiploj de la vero. **2.** Ĉar estante ĝuste instruita kaj generita pere de la parolo bonvola, — kiu ne ekdezirus funde lerni tion, kio per la Parolo¹⁶ estis montrita al la disĉiploj? Por tiuj plene klariĝis la parolo ĉe sia apero, senkaŝe parolante. Nekomprenite de la nekredantoj, li rakontadis al la disĉiploj, kiuj, de li rekonitaj kiel fidelaj, ekkonis la misterojn de la Patro. **3.** Por tio Dio sendis la parolon, ke li klariĝu al la mondo.

De sia propra gento li estis nehonorata, de la apostoloj li estis predikata, de la popoloj kredata. **4.** Li, kiu estas de la komenco, kiu aperis nova kaj montriĝis praa kaj kiu ĉiam refoje naskiĝas nova en la koroj de la sanktuloj. **5.** Li, kiu ĉiam, kiu hodiaŭ estas rekonata kiel Filo, dank' al kiu riĉiĝas la eklezio kaj abundiĝas la graco, disvolviĝante, en la sanktuloj; graco kiu liveras intelekton, klarigas misterojn, anoncas la decidajn momentojn, ĝojas pri la fidelaj, kiu sin donacas al la serĉantoj, kiuj ne rompas la ligojn de la fido nek transpaŝas la limojn de la patroj. **6.** Respekton por la Leĝo¹⁷ oni prihimnas, la gracon de la profetoj rekonas, kaj oni fortigas la fidon je la evangelioj, gardas la tradicion de la apostoloj, — kaj la graco de la eklezio saltedancas!

7. Se tiun gracon vi ne tristigas, vi ekscios, kion parolas la parolo — tra tiuj, kiujn li volas, kaj kiam li volas. **8.** Ĉar ĉiufoje, kiam pro la volo de la ordonanta parolo ni instigiĝis ion pene klarigadi, ni komuniĝis al vi pere de la amo je tio, kio estis rivelita al ni.

16 Depost xi.2 "parolo" fariĝas kvazaŭ centra termino: oni memortenu, ke Jesuon oni titolis la Parolo de Dio.

17 Leĝo = Torao.

ΧΙΙ.1. Οἷς ἐντυχόντες καὶ ἀκούσαντες μετὰ σπουδῆς εἴσεσθε, ὅσα παρέχει ὁ θεὸς τοῖς ἀγαπῶσιν ὀρθῶς, οἱ γενόμενοι παράδεισος τρυφῆς, πάγκαρπον ξύλον εὐθαλοῦν ἀνατείλαντες ἐν ἑαυτοῖς, ποικίλοις καρποῖς κεκοσμημένοι. **2.** ἐν γὰρ τούτῳ τῷ χωρίῳ ξύλον γνώσεως καὶ ξύλον ζωῆς πεφύτευται· ἀλλ' οὐ τὸ τῆς γνώσεως ἀναιρεῖ, ἀλλ' ἡ παρακοὴ ἀναιρεῖ. **3.** οὐδὲ γὰρ ἄσημα τὰ γεγραμμένα, ὡς θεὸς ἀπ' ἀρχῆς ξύλον γνώσεως καὶ ξύλον ζωῆς ἐν μέσῳ παραδείσου ἐφύτευσε, διὰ γνώσεως ζωὴν ἐπιδικνύς· ἢ μὴ καθαρῶς χρησάμενοι οἱ ἀπ' ἀρχῆς πλάνη τοῦ ὄφους γεγύμνωται. **4.** οὐδὲ γὰρ ζωὴ ἄνευ γνώσεως οὐδὲ γνῶσις ἀσφαλῆς ἄνευ ζωῆς ἀληθοῦς· διὸ πλησίον ἐκάτερον πεφύτευται. **5.** ἦν δύναμιν ἐνιδῶν ὁ ἀπόστολος τὴν τε ἄνευ ἀληθείας προστάγματος εἰς ζωὴν ἀσκουμένην γνῶσιν μεμφόμενος λέγει· Ἡ γνῶσις φυσιοῖ, ἡ δὲ ἀγάπη οἰκοδομεῖ. **6.** ὁ γὰρ νομίζων εἰδέναι τι ἄνευ γνώσεως ἀληθοῦς καὶ μαρτυρουμένης ὑπὸ τῆς ζωῆς οὐκ ἔγνω, ὑπὸ τοῦ ὄφους πλανᾶται, μὴ ἀγαπήσας τὸ ζῆν. ὁ δὲ μετὰ φόβου ἐπιγνούς καὶ ζωὴν ἐπιζητῶν ἐπ' ἐλπίδι φυτεύει, καρπὸν προσδοκῶν. **7.** ἦτω σοὶ καρδία γνῶσις, ζωὴ δὲ λόγος ἀληθῆς, χωρούμενος. **8.** οὐ ξύλον φέρων καὶ καρπὸν αἰρῶν τρυγήσεις ἀεὶ τὰ παρὰ θεῷ ποθούμενα, ὧν ὄφεις οὐχ ἄπτεται οὐδὲ πλάνη συγχρωτίζεται. **9.** καὶ σωτήριον δείκνυται, καὶ ἀπόστολοι συνετίζονται, καὶ τὸ κυρίου πάσχα προέρχεται, καὶ καιροὶ συνάγονται καὶ μετὰ κόσμου ἀρμόζονται, καὶ διδάσων ἅγιος ὁ λόγος εὐφαίνεται, δι' οὗ πατὴρ δοξάζεται.

ᾧ ἡ δόξα εἰς τοὺς αἰῶνας.

ἀμήν.

XII.1. Se tion ĉi vi ĉeestis kaj aŭskultis kun atento, vi scios, kiom donas Dio al tiuj, kiuj Lin amas lojale, kiuj — por tiel diri — fariĝis paradizo de plezuro, kiuj kreskigas en si mem multfloran arbon belburĝonan, mem ornamite de bunteco fruktara. **2.** Ĉar tie ĉi estis plantita la arbo de la scio kaj la arbo de la vivo; sed ne la arbo de la scio mortigas, sed la malobeo mortigas. **3.** Ĉar ne sen subsignifo estas la skribitaĵo, ke “de la komenco arbon de la scio kaj arbon de la vivo Dio plantis meze de la paradizo”;¹⁸ tio al ni montras la vivon tra la scio; sed kiam la homoj de la komenco ĝin uzis ne prave, ili estis nudaj pro la trompo de la serpento. **4.** Ĉar ne ekzistas vivo sen scio, nek sekura scio sen vera vivo: tial ambaŭ estis plantitaj tiel apude. **5.** Nu, tiun ĉi sencon komprenante, sed mallaŭdante tiun scion, kiu sen ordono de la vero strebas al la vivo, diras la apostolo: “la scio bloveŝveligas, sed la amo edifas”.¹⁹ **6.** Ĉar kiu opinias ion scii — sen vera scio priatestata de la vivo —, tiu ne havas scion, sed estas trompata de la serpento, ĉar li ne amis la vivon. Sed kiu kun timo ekscias kaj restas serĉanta la vivon, tiu estas plantita en espero kaj atendas frukton. **7.** Nu jen: koro estas scio; kaj la vivo — la vera Parolo, se komprenata. **8.** Se ties arbo kreskas kaj fruktigas, vi ĉiam plukos tion, kio estas agrabla antaŭ Dio, kion nek serpento povas tuŝi nek trompo enŝteliĝas; kaj Eva ne neniigas <tiam>, sed ŝin oni kredas virgulino; **9.** kaj la saviĝo estas montrata, kaj la apostoloj fariĝas saĝuloj, kaj la Pasko de la Sinjoro proksimiĝas, kaj vaksatorĉoj alportiĝas kaj okazas la nupto kun la mondo, kaj dum ankoraŭ la sanktulojn li instruas, la Parolo plengojiĝas, — en kiu gloriĝas la Patro.

Al Li estu la gloro en la tempegojn.

Amen.

18 Gen. 2:9.

19 I Kor. 8:1.

La fragmento de Kvadrato

Eŭsebio — Historio Eklezia IV, 3, 1-2

Post kiam Trajano regis plenajn dudek jarojn minus ses monatoj, Elio Hadriano transprenis la hegemonion. Al li direktis paroladon Kvadrato, kiu faris ĉi apologion de nia religio, ĉar kelkaj fiuloj provis ĝeni la niajn; ankoraŭ nun ekzistas ĉe pluraj el niaj fratoj — kaj ankaŭ ĉe ni — ties teksto; el ĝi eblas vidi la brilajn pruvojn de lia intelekto kaj de lia apostola ortodokseco.

Mem li montras sian praecon per tio kion li diras propraparole: “sed la faroj de nia Savinto ĉiam ĉeestis, ili ja estis realaj: la sanigitoj, la resurektintoj elinter la mortintoj, kiujn oni ne nur vidis sanigitaj aŭ resurektintaj, sed ili ankaŭ ĉiam ĉeestis, ne nur dum la Savinto ankoraŭ estis inter ni, sed ankaŭ ankoraŭ iom da tempo post lia forpaso, tiel ke kelkaj el ili eĉ pluvivas ĝis nia propra tempo.”

Glosoj

<i>arĥonto</i>	en Ateno antikvatempe oni regule elektis (ĉiujare) la naŭ gvidantojn kies ĝenerala titolo estis arĥonto (= reganto)
<i>barbara</i>	helena vorto indikanta ĉiujn alilingvulojn, do = ne-helena
<i>Cezaro</i>	Imperiestro de la Romia Imperio (ĝenerala titolo, same kiel tiu de <i>Aŭgusto</i> aŭ <i>Imperatoro</i>)
<i>drivi (XI.1)</i>	agi kvazaŭ sen celkonscio
<i>editori</i>	prizorgi kiel eble plej fidindan eldonon de aliies teksto, ne kiel eldonisto sed rilate la sciencefakan, filologian flankon (fiksado de vortformo origina, prinotado de arĥaismoj k.s.)
<i>humanisto</i>	ĉi tie en la senco Renesanc-epoka
<i>jc</i>	jarcento
<i>kodekso</i>	manskribitaĵo el kunkudritaj folioj, ofte sur pergameno
<i>lakuno</i>	truo en teksto sur ekz. kodekso
<i>patrio</i>	patrujo
<i>spekulacio</i>	koncept(ar)o bazita sur pure teoria rezonado (P.I.V. spekulativa)

Enkomputiligita de Efthimios Mavrogeorgiadis kaj
korektita de la tradukinto en novembro 2005.

Distribuata pere de www.esperanto.gr.